Tyron Surmon
@Tyroncs
Tyrontoo@gmail.com



Karaj samideanoj,

Mia nomo estas Tyron, mi estas 24-jaraĝa viro de Britio, kaj nuna vicprezidanto de TEJO. Mi eklernis Esperanton en 2015, kiel 16-jaraĝulo, kaj estis unu de la unuaj membroj de la 'Duolingo-generacio'. Ekde tiam mi havis sufiĉe plenan "karieron" en Esperantujo (kiel videblas en mia vivresumo). Nun, kiel la kulmino de tio, mi kandidatiĝas esti la prezidanto de TEJO.

La Elekta Komisiono devis sufiĉe forte konvinki min resti en la estraro. Mi delonge konsideris ĉu mi fakte volas liberiĝi de miaj respondecoj, kaj denove havi tempon dum miaj vesperoj kaj semajnfinoj…sed finfine mi decidis kandidatiĝi. Estas 2 ĉefaj kialoj:

Unue, dum la jaroj mi akiris profundegan komprenon de la kapabloj kaj bezonoj de nia organizo. Kvankam unuflanke TEJO estas reto de junaj esperantistoj kun specifa pozicio en nia movado, aliflanke ĝi ankaŭ estas vera *organizo* - kun profesiaj devoj, dungitoj kiujn ni devas mastrumi, kaj kontraktitaj respondecoj por plenumi. Oni povas esti elstara esperantisto, sed malbona estrarano de internacia junulara organizo. Konsidere ke mi nun havas tiujn spertojn, mi sentis ke se mi ankoraŭ havas la energion por la posteno, mi devus utiligi ĝin.

Due, kaj pli grave, mi ankoraŭ havas multajn ideojn por TEJO kiujn mi volas realigi! Estas tro multe por facile detaligi en unu letero. Inkluzivas daŭrigon de miaj nunaj taskoj – kiel la sukcesa fintraktado de AKSO – kaj ankaŭ pli 'estontalfrontaj' aferoj, kiel nova retejo kaj multe pli ambicia laboro pri informado. Mia tempo en la estraro ĝis nun ĉefe temis pri solvado de kelkaj krizoj. Nun ke TEJO troviĝas en pli stabila pozicio, mi esperas ke nun estos la taŭga momento por tiaj iniciatoj.

Dankon por via konsidero, kaj mi esperas ke vi bone taksos mian kandidatiĝon :)

Amike,
Tyron